

KINTAKTO

numero 241 (2011:I)

NOVA FORMATO
24-PAGA!

Mondo

Vilaĝo kiu rezistas
danke al sia biero

Kinarto

Filma jaro 2010

La blaga blogo

La blogo de radia
aŭskultanto

Sinmortigo

Konsideroj pri la 10^a mortokaŭzo
en la mondo

Intervjuo kun Simmon K. Barney, la kreinto de "Ĉapeloj"



tejo

Tutmonda Esperantista
Junulara Organizo



tejo.org



MANĜI, TRINKI KAJ MEMBRI EN TEJO

Tri bazaj nepraĵoj por povi ĝui la vivon. Ni provu menci
kelkajn kialojn, kial bonas esti individua membro en
TEJO, kvankam ili multegas: Vi estas en kontakto kun
tutmonda juna E-komunumo; malkovriĝos al vi bunta
kultura diverseco pere de la renovigita revuo Kontakto,
kiun ĉiu membro ricevadas; tutmonde gastigas kaj
gastas pere de Pasporta Servo kaj vi ankaŭ povas pli
favorpreze aliĝi al IJK, la plej granda renkontiĝo de junaj
esperantistoj el la tuta mondo.



Ĉion pri aliĝo al TEJO vi trovas ĉe:

<http://www.tejo.org/eo/membrigho>



Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA).

Fondita en 1963.

N-ro 241 (2011:1), 46-a jarkolekto

ISSN 0023-3692.

Legata en ĉ. 90 landoj.

TTT-pago: <<http://kontakto.tejo.org>>.

Eldonanto (administrado, abonoj, anoncoj): UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@co.uea.org>.

Redakcio: Kontakto, Rua José Guidini Jr, 229, Ribeirão Preto, SP, Brazilo, 14093-540 <kontakto@tejo.org>

Redaktoro: Rogener Pavinski

Enpaĝigo: Romulo Felício

Korektisto: Rob Moerbeek

Presado: Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), <skonpres@poczta.onet.pl>

Konstantaj kunlaborantoj: Aleksander Osincev (Rusio), Alexandre Baudry (Francio), Olubunmi Osho-Davies (Niĝerio), Victor Solé (Katalunio), Facilingvaj artikoloj estas verkitaj en la niveloj tre facila kaj facila, laŭ la vortolisto de Kontakto. Tiu listo troviĝas en nia retpaĝo.

Anonctarifo: tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas makleraĵon de 30%. Por anoncoj bv. kontakti UEA.

Anoncetoj: por Anonctabulo 0,25 EUR por unu vorto. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA.

Abontarifo: Varias laŭlande. Kontrolu ĉe nia retejo.

Malfortvidantoj: povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Salahutuplein 40, NL-5262 ZN Vught, Nederlando.

Kontakto en radioj: Radio 3ZZZ: <http://www.3zzz.com.au/>



ĜD Edukado kaj Kulturo

Tiu ĉi eldono estas financita kun subteno de la Eŭropa Komisiono. La publikaĵo tamen nur reflektas la vidpunkton de la unuopaj aŭtoroj, kaj la Eŭropa Komisiono neniel respondecas pri ajna uzo de la informoj.

La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.

Redakcie

Ni jam estis laborantaj sur la enpaĝiga procezo pri tiu ĉi numero kiam terura katastrofo trafis Japanion. Granda tertremo, ĝia sekvanta cunamo kaj la nuna nukleakcidenta minaco multe suferigas la Japanan popolon. Dum mi verkas tiun enkondukon oni preskaŭ senespere provas eviti nuklean katastrofon ĉe la atomenergia centro “Fukuŝima 1”. La tuta mondo konsternite spektas kaj atendas la sekvojn de tiuj okazaĵoj, kiuj ankoraŭ ne bildigas baldaŭan finon.

Sed krom la konstanta natura minaco, ĝi ankaŭ suferas alian problemon, kiu ĉi-eldone ilustras nian kovrilon – Sinmortigon. Japanio estas unu el la landoj en la mondo, kie oni plej multe sin mortigas. La situacio estas pli-malpli la sama la en tuta Azio, kaj ne pli bona en la Orienta Eŭropo. Ne harzade sinmortigo estas la 10^a mortokaŭzo en la mondo. Se ni ne povis profunde analizi ĝin, ni tamen prezentas al vi du kontribuojn, de Henri Masson kaj Alexandre Baudry, kiuj informas kaj invitas al plua diskuto pri la temo.

La revuo ne havas nur malgajajn temojn. Por alporti iom da gajo, ni intervjuis la animaciiston Simono K. Barney, kiu ĵus kreis du mallongajn filmetojn, kiuj altiris atenton pro siaj bonhumoro kaj spriteco! Ankoraŭ pri kulturo, nia kunlaboranto Aleksander Osincev prezentas superrigardon pri la filma jaro 2010, kaj diskuton pri kopirajto, kiun li ekigis en pasinta eldono daŭrigas per reago, Sergey Tyrin. Plezure ni anoncas novan rubrikon, tiu estas la “Blaga Bloga”, de Viktoro Solé, en kiu li ekde nun satire kaj amuze prezentos fikciajn blogaĵojn.

Kaj estas pliaj novaĵoj – Post longaj diskuto kaj esploro ni decidis reveni al la tradicia formato de la gazeto, kiun ĝi havis ĝis en la 90aj jaroj - iomete malpligranda ol en la lastaj jaroj. Ni ankaŭ aldonis 8 novajn paĝojn al la revuo. Kontakto dikigās! Bonege, ĉu ne? Per ambaŭ ŝanĝoj, ni celas fari ĝin pli facile kaj ĝue legebla. El tiuj novaj paĝoj, el tiu, 4 estos dediĉitaj al nova movada rubriko “TEJO-Tutmonde”. Kvankam ĝi havas la saman nomon, ĝi ne estas la vera revuo “TEJO-Tutmonde”. La tradicia informilo de TEJO ne plu ekzistos kiel revuo aparta, sed ni decidis daŭre uzi ĝian nomon pro la historio kaj tradicio, kiun ĝi havas. Pliajn detalojn pri tio vi trovos en la retejo de TEJO.

Ni kore dankas pro la pluraj bonegaj reagoj, kiujn ni ricevis pro nia laboro pri la pasinta eldono kaj ankaŭ pardonpetas pro la etaj stumbloj. Al ĉiuj kunlaborantoj, koran dakon. Ni estas malferma kaj atendas viajn reagojn kaj kontakton. Bonan legadon!



Foto: Manuel Pancorbo

ENHAVO

Reagoj, novaĵoj	4
Intervjuo Simmon Keith Barney	5
Ekologio Permakulturo	8
Ĉefartikolo Sinmortigo	9
Memmortigo de junuloj	10
Kial oni ne rajtas sinmortigi?	12
Kulturo Libera arto kaj senpagaj artistoj	13
Mondo Vilaĝo kiu rezistas danke al sia biero	14
Kinarto Esperanta kinarto vivas malgraŭ la esperantistoj	16
La Blaga Bloga Bloga de radia aŭskultanto	18
TEJO tutmonde	19
Informoj	23



Viaj reagoj kaj komentoj estas bonvenaj. Kontakto nin per la retadreso kontakto@tejo.org

Mi volis vere kaj sincere gratuli vin pro la nova eldono de Kontakto. Ĝi estas elstare bona kaj interesa kaj vere tute nova gazeto kun tre alloga aspekto. Kelkajn skriberojn en la intervjuo kun inicialoj dc mi trovis, sed tio estas banalaĵo.

La artikoloj laŭ enhavo estas interesaj kaj kunigas informojn el diversaj partoj de la mondo, pripensendajn kaj ne tiom facile troveblajn aliloke. Vi vere faras bonegan laboron kaj tute revalorigis la gazeton. Multan dankon!

Felix ZESCH
Germanio

Hieraŭ mi ricevis la lastan numeron de Kontakto! Leginte kaj vidinte la novan, belan kaj buntan paperman

de Kontakto, mi eĉ emas pli regule kontribui! Mi jam cerbumas pri aliaj eblaj interesaj artikoloj!

Andy Hernández MARTÍNEZ
Kubo/Hispanio

Mi tutkore gratulas pro via nova Kontakto. Kaptis min egale kaj ĝia formo kaj la enhavo.

Mi deziras al vi ambician energion kaj daŭran sukceson sur tiu vojo.

Géza KURUCZ
redaktoro de Juna Amiko

Kontakto montriĝas vivoplena, ĉiam denove. Gratulon al ĝia redakcio, al TEJO kaj al la abonantaro! Kun koraj salutoj.

Adriaan DEN HAAN
Teknika redaktoro dum la unuaj jaroj de Kontakto

Mi ĵus trafolumis la pdf-aĵon rapide, kaj tuj konstatas, kun ĝojo, ke nia longe pribedaŭrata Kontakto resurektis! Mi ankoraŭ ne legis el ĝi, sed almenaŭ la grafiko vive krias. Jen kiel devas aspekti revuo por junularo.

Gratulon al Rogener kaj liaj kunlaborantoj, ĉefe al la respondeculo pri grafiko, pro la multa kaj bone farita laboro, kaj pluan gratulon al TEJO pro la trafa elekto de Rogener. Nun mi denove kuraĝos malfermi Kontakton kaj eble eĉ kunlaboros.

Francisco Luis VEUTHEY
Eks-redaktoro de Kontakto

NOVAĴOJ

Intervjuo

Fine de januaro aperis intervjuo kun la ĉefredaktoro Rogener Pavinski en la retejo Libera Folio kun la temo "Nova Kontakto jam ne nur por gejunuloj".

La intervjuo altiris 21 komentojn, el kiuj tamen 19 rilatis al la gramatika taŭgeco de la vorto "gejunuloj".



Ni eraris

Le mankis supersignoj, alie rimarkblis skriberoj kaj eĉ noto de la revizianto fuĝis el niaj okuloj en la pasinta numero - la unua sub nia respondeco. La redakcio pardonpetas pro la eraroj, kiuj estis kaŭzitaj pro unuafoje kaj tempo-premo prepari ĝin. Ni petas vian indulgon.

Premioj

La revuo Kontakto, kune kun la disko-eldonejo Vinilkosmo lotumis kvin mp3-formajn albumojn de Inicialoj DC – Urbano inter la kontribuantoj de la pasinta duobla eldono (nr-o 239/240). La gajnintoj estis Andy MARTÍNEZ, Gijom ARMIDE, Aleksander OSINCEV, Thierry SALOMON kaj Neusa MENDES. Gratulon!



Ĉeftemoj

La jam kutimaj kaj tradiciaj temoj por ĉiu eldono de Kontakto ne plu estos antaŭanonceblaj. Kontakto tiel fariĝas pli malfermtema, do vi povas kontribui al ĝi per diversstaj artikoloj. Sed por ke la kontribuantoj ne perdu instigon verki, ni disponigas en nia retejo kelkajn temo-proponojn por artikoloj al venontaj numeroj de Kontakto.

Simmon Keith Barney

Filmetoj por ridigi ĉe krokodilojn

PER ROGENER PAVINSKI kaj Aleksander OSINCEV

Komence de la jaro aperis en la reto du animaciaj filmetoj: "Ĉapeloj" kaj "Neĝulo". Tiuj estas la titoloj de la unuaj filmetoj ellaboritaj de Simmon K. BARNEY aŭ simple Simono por esperantistoj, ĉe Vankuvera filmo-lernejo, kie li studas en Kanado. La filmetoj allogis atenton pro tio ke ili verŝajne estas la unuaj profesiaj animacioj originale kreitaj en Esperanto. Eĉ se apenaŭ estas teksto en la filmetoj, ili kompreneblas nur por esperantistoj.

Animacioj kaj desegnado interesas lin ekde inafanaĝo. Ankaŭ la unuaj spertoj pri animacioj rilatis al Esperanto kaj, eĉ se li ne tiom fieras pri ili, instigis lin daŭrigi la studadon sur tiu kampo. Koscian ke la kinoarto en Esperanto estas tre malgranda kaj ke tiu "truo" en nia kulturo verŝajne estas la kaŭzo ke multaj homoj ne povis kompreni la signifon de la filmoj de li kreitaj, tio ne malhelpis, sed inverse, ĝuste tial li decidis "ne nur revii pri nova epoko, sed provi realigi ĝin".

Kiam kaj kial vi komencis okupiĝi pri animacioj?

Dum mia infaneco, mia ĉefa ŝatokupo estis desegnado. Kaj mi ĉiam interesiĝis pri animacio. Sed kiam mi provis ĝin mem, mi malsukcesis. Mi kreis unu-du "foliofilmojn" per fasko da desegnaĵoj, kiun oni turnadas per la dikfingro. Sed tiam mi ne konis nek komprenis la principojn kaj metodojn de animacio. Do miaj provoj fiaskis kaj mi perdis esperon.

Sed antaŭ kelkaj jaroj mi kuraĝis denove eksperimenti kun animacio pro la ekzisto de rilata softvaro. La rezultoj estas nun iom hontigaj al mi, sed ili tiam redonis al

mi esperon kaj inspiron. Mi eksciis ke ekzistas libroj pri animacio kaj eĉ lernejoj. (Mi ne scias, kial mi ne antaŭe pensis pri tiuj ebloj.) Do januare de 2009 mi eniris kurson ĉe la Vankuvera filma studejo, Vancouver Film School, kaj komencis vere lerni animacion. Dum mia edukado tie mi faris du filmetojn, ambaŭ en Esperanto: "Ĉapeloj", tradicie desegnita sur papero, kaj "Neĝuloj", animaciita per la programo Adobe Flash.

Ĉu tiuj filmetoj estis viaj unuaj animaciaj spertoj?

Nu... mia unua eksperimento temis pri la rolulo Zam, verda marsano kiu aperas

ĉe "lernu". Mi adaptis la enkondukan lecionon de la kurso Vojaĝu Kun Zam. Mi nun iom malfieras pri tiu provo. Mi komprenis nenion pri animacio kiam mi faris tion! Sed mi ankoraŭ taksas la kurson adaptinda kaj mi ŝatus povi reanimaci tiun enkondukon kaj adapti la restantajn lecionojn.

Poste venis muzikvideo "Podkasto Por Vi". La animacio estas eble iomete malpli aĉa. Sed pri la kanto, mi devas konfesi ion. Ĝi aperis en unu el la elsendoj de Radio Verda. Post kiam mi aŭdis ĝin, ĝi fiksis sin en mia menso por semajnoj. Kia sufero! Mi aldonis animacion al ĝi nur kiel rimedon forpeli ĝin el la menso! Se infero



Foto: Tam FRAGER



Simono kun ĉapelo

ekzistas, ĉu tie estas loko por homoj kiuj disvastigas 'orelvermojn'?

Feliĉe miaj du filmoj estas pli spektindaj ol tiuj unuaj provoj.

Rakontu pri "Ĉapeloj". Kiel vi ekhavis la ideon pri kreo de tiu filmeto kun vorto-ludo?



"Foje miaj kunstudentoj kaj instruistoj esprimis dubon pri mia decido fari filmojn en Esperanto"

Nu, animacio estas jam malfacila tasko, aparte por studento. Sed ĝi iĝas eĉ pli defia kiam oni devas sinkronigi lipajn movojn al parolado. Ĉe la lernejo estas apenaŭ sufiĉe da tempo por fini filmon antaŭ la limdatoj, do mi emis fari filmon sen voĉoj.

Mi konfesu ke mi ŝatas kalemburojn. Inspiris min ankaŭ la fuŝparolado en la poemo Ebrio de William Auld. Eble pro tio mi rimarkis eblan tipon de vortludoj, kiun mi ne antaŭe vidis. Per listo de tiaj vortoparoj, mi kreis rakonton, kiun ankaŭ krokodiloj povas ĝui. Sed la rezulto ja estas filmo, kiun nur spertaj esperantistoj povas tute kompreni.

Mi ĉiam taksis mian filmon kultura afero. Do mi kaŝis multajn detalojn en la filmo kiujn nur esperantistoj rimarkos. (Kiom da E-simboloj vi povos trovi?) La omaĝo al Vola Pug' ankaŭ estis tia detalo. Ne temas pri vera kunlaboro, ĉar Vola Pug' ne plu ekzistas. Sed kelkaj el la ŝercoj en mia filmo ŝajne taŭgus en "la reta gas-eto", do mi decidis kundividi la kulpon... nu, agnoskon al ĝi.

Kiel estiĝis la dua filmo, "Neĝuloj"?

Post kvar frenezaj, sendormaj monatoj da laborego, anstataŭ gratuli nin pro niaj unuaj filmoj, la lernejo punis nin per devo tuj lerni novan programon kaj krei duan filmon en nur kelkaj semajnoj. La plejmulto de la studentoj havis tiom malmulte da energio kaj inspiro ke ni elektis fari ion simplan.

Por spekti la filmetojn

ĈAPELOJ <http://vimeo.com/19185725>NEĜULOJ <http://vimeo.com/19186147>



En Neĝuloj, mia amo de vortludoj estas denove evidenta. Sed ĉi-filme estas iomete da dialogo. (Aŭskultantoj de Esperanta radio verŝajne rekonos la voĉojn.) La rezulto estas mallonga sed amuza.

Kiujn reagojn vi havis ĝis nun?

Pri "Ĉapeloj" la reagoj estas ĉefe favoraj. Kaj e-istoj kaj krokodiloj ĝuas ĝin. Sed foje mi ricevas plendojn (de ambaŭ grupoj) ke ili ne komprenis ĝin. Ankaŭ "Neĝuloj" ridigas esperantistojn kaj animaciajn studentojn. Sed al aliaj homoj ĝi estas ŝajne nekomprenebla.

Ĉu ekzistas io kio inspiras vin?

Tro multe inspiras min por nomi. Laŭ la vortoj de Persone, "Kio ajn povas okazi kiam ajn". Do troveblas inspiro kie ajn, en kaj el Esperantujo. Unu inspiro estas la teksto de esperantaj muzikistoj. Dum momentoj de malespero, mi memoras aŭskulti la kanton Junaj Idealistoj de Dolchamar. Tio donis al mi iom da kuraĝo. Ankaŭ vi "efektivigu vian revon".

Foje miaj kunstudentoj kaj instruistoj esprimis dubon pri mia decido fari filmojn en Esperanto. Tiam mi rigardis poŝtokartojn, kiujn sendis esperantistoj ĉirkaŭ la mondo. Sur ili amikoj kaj nekonatoj

"La kulturo de Esperanto estas bunta, sed pri la kino de Esperantujo oni nur honte mencias ĝin pro ĝia eteco"



Ĉe la desegnotablo

@ Youtube



La marsano "ZAM" kaj la eta muzikvideo "Podkasto por vi" estis la unuaj provoj de Simono per movbildoj.



kuraĝigis min fini miajn filmojn. Al ili mi ŝuldas multe.

Kial vi kreas esperantlingve? Ĉu la celgrupo estas sufiĉa por vi?

Mi mem volas spekti filmojn en Esperanto. Se mi kreas filmojn Esperantajn, eble tio instigos aliajn kreemulojn. La kulturo de Esperanto estas bunta. E-istoj fiere fanfaronas pri niaj poezio, literaturo, muziko, radio, kaj eĉ dramo. Sed pri la kino de Esperantujo oni nur honte mencias ĝin pro ĝia eteco. Do mi decidis ne nur revii pri nova epoko, sed provi realigi ĝin.


Mi komprenas ke la spektantaro de esperantaj filmoj estas malgranda kompare kun aliaj lingvoj. Sed tio ne ĝenas min.

Ĉu vi povas malkaŝi viajn planojn?

Mi esperas fari pliajn filmojn en E-o. Ankaŭ estas kelkaj kantoj, kursoj kaj aliaj Esperantaj projektoj kiuj povus profiti de animacio. Tamen, nuntempe, mi pretas akcepti tion kiel flankokupon. Ĉiu devas iel vivteni sin. Sed kiu scias? Mi bonvenigas surprizojn. ■

Permakulturo

LEIF ARNE STORSET – NORVEGIO



Bill Mollison,
kunkreanto de
la permakulturo

En 1974 du aŭstralianoj studis sian landon: Parte sen pluvo kaj erodata de vento, sed aliparte kun fekundaj arbaroj. La arbaroj estas ĉiam verdaj kaj produktantaj, sen detruaj rezultoj. La homoj, Bill Mollison kaj David Holmgren, de-

mandis sin: Ĉu ni povas lerni de la arbaro, kiel konstrui ekosistemojn utilajn por homoj?

Kune ili kreis metodojn por konstrui tiajn sistemojn, kiuj estu diversaj, stabilaj, kaj rezistemaj kiel la naturo. La ideo estas ke la homo estas ero de la naturo, ne aparta.

Kiel kompreni tian sistemon? Pensu unue pri la faktoroj mediaj: suno, vento kaj akvo, kaj kiel utiligi ilin en via sistemo. En Aŭstralio akvo estas



Permakultura bieno


granda manko, por ni en Norvegio ne tiom, sed al ni pli mankas suno. Se vi plantas arbojn en duoncirklo kontraŭ la sudo ĉirkaŭ flako, ili ne devas konkuri pri la suno. Pro la akvo la arboj havas duoble da sunlumo, kaj vi havas plaĉan lokon por naĝi!

La sunlumon oni povas maksimume utiligi per multaj niveloj de plantoj. Kiel en arbaro, ĉiu nivelo kaptas per la folioj iom de la lumo, kaj pumpas per la radikoj iom da

nutreroj el la humo. Vidu la sep nivelojn sur la bildo. Ĉi tie en la nordo oni malofte povas vivteni ĉiujn sep, sed tri aŭ kvar ofte funkcias, ankaŭ en la naturo.

Por la akvo en la supra ekzemplo ni menciis du funkciojn: lumreflekton kaj naĝadon. Sed ĉu ĝi povas havi eĉ pli? Eble ĝi povas esti habitato por anasoj, kiuj povas manĝi limakojn. En permakulturo oni klopodas ke ĉiu organismo havu minimume tri funkciojn en la sistemo. Arbo ekzemple kaptas sunon, portas fruktojn, kontraŭas venton — kaj eĉ subtenas vian hamakon!

Male, ĉiun funkcion havigas al mi tri organismoj. Do: Manĝo venadas de pomoj, piroj, terpomoj, nuksoj... Kiam unu cedas, vi havas multajn pretajn rezerveojn. Tiun lecionon lernis dolore la irlandanoj en 1845, kiam malsaniĝis iliaj terpomoj. Sen sufiĉe da alispeca manĝo komenciĝis kvarjara malsatego, dum kiu duoniĝis la loĝantaro. Diverseco kreas stabilecon. ■



LA ARBARA ĜARDENO: SEP NIVELA AVANTAĜA
ARBARA GILDO

Sep niveloj de plantoj por maksimume utiligi sunlumon

Bazita sur prezento de Douwe Beerda
ĉe www.ustream.tv/recorded/2333569
— spektu ĝin por lerni plu. Vidu ankaŭ
www.permakulturo.no.

Aperigita originale en Inter ni
dirite, N-ro 6/2010

Sinmortigo

Konsideroj pri la 10^a mortokaŭzo en la mondo


LA REDAKCIO

Pli ol 1 miliono da homoj sin mortigas ĉiujare, tial sinmortigo estas la 10^a mortokaŭzo en la mondo, pli ol urbana perforto kaj militoj laŭ MOS – Monda Organizaĵo pri Sano. Ĝi estas unu el la ĉefaj mortokaŭzoj de homoj kun malpli ol 35 jaroj. En la tuta mondo la nombro de sinmortigoj kreskis 60% dum la lastaj 50 jaroj, ĉefe en disvolviĝantaj landoj.

La statistikoj estas pli altaj en la baltaj landoj kaj en orienta Eŭropo, kie ĉirkaŭ po 30 el ĉiu centmilo da homoj sin mortigas ĉiujare. La

plejmulto de la sinmortigoj okazas en Azio, tie oni kredas ke okazas ĉirkaŭ 60% de ĉiuj sinmortigoj en la mondo. Laŭ MOS, Ĉinio, Barato kaj Japanio respondecas pri 30% de la tutteraj sinmortigoj, statistike tamen en la mondo, plej multe oni sin mortigas en Litovio, kun po 31 por ĉiu centmilo da homoj.

La plejmulto de sinmortigoj estas efektivigataj de viroj, sed virinoj plejmulte foriĝi de la vivo. Jen ni prezentas du artikolojn, kiuj kontribuas al tiu malgaja sed tre grava temo. ■



Memmortigo de junuloj

HENRI MASSON – FRANCO

La franca TV-elsendo “L’effet papillon” (la papilio-efiko) estas ofte enhave pripensinda. La 18an de decembro 2010, Daphné Roulier [Dafne’ Rulje’] pritraktis fenomenon daŭre disvastiĝantan en lando kiu, tro ofte malprave, fascinas homojn en la tuta mondo: Usono.

Sub la nomo “bullying” (ĉikanado*), tiu fenomeno ne tute nova atingas maltrankviligan dimension en usonaj lernejoj. “School bullying” (lernejoĉikanado) povas esti multforma : turmentado per insultoj, ripetataj atakoj parolaj aŭ fizikaj, humiligoj, provokoj, frapoj, ŝtelo aŭ difekto de personaj objektoj, falsaj akuzoj, agresemaj mesaĝoj, ktp. Pro iu ajn kialo, infano fariĝas viktimo de samlernejanaj. Parto el tiuj infanoj ne plu povas konfidi aŭ elteni la moralan suferon, ili ne plu volas frekventi lernejojn, ili eĉ perdadas emon pluvivi... Plioftiĝas kazoj de venĝocela murdo sed ankaŭ, ĉefe, de memmortigo. Tio en lando kies influo estas grava, eĉ ekscesa en la tuta mondo, kaj kies devizo “In God We Trust” (Pri Dio ni kredas) aperas sur ĉiu monbileto... Malfeliĉa kaj malbonŝanca Dio !...

Statistikoj de Nacia Instituto pri Sano, havigas pli precizan ideon pri la graveco de tiu fenomeno en Usono.

Lernejoĉikanado etendiĝas ankaŭ en alia lando, kiu same apartenas al la grupo de la plej riĉaj: Japanio. La informbulteno Hodiaŭ Japanio, la 24an de novembro 2010 raportis pri freŝdata kazo sub la titolo: “Japanio konfrontita kun memmortigo de lernejanaj, viktimoj de lernejoĉikanado”. En Sapporo, 13-jara knabino vokis la policon por diri “Temas pri memmortigo” kaj tuj sin ĵetis el la balkono de sia multetaĝa domo. Sur papero ŝi skribis ke ŝiaj samlernejanaj diris ŝin “horora” kaj ŝi indikis ties nomojn. La 23an de oktobro, alia lernantino sin pendumis en Kiryu pro tio ke, malgraŭ plendoj, ŝiaj samlernejanaj plue turmentis ŝin jam de semajnoj.

En tiu artikolo aperas jena frazo : “Japanio havas reputacion de lando

sekura kaj neperforta, sed la statistikoj montras alian aspekton”. Kaj, efektive, laŭ la japana ministerio de edukado : okazis 60 913 incidentoj en 2009, t.e. kresko de 37% en kvar jaroj, inkluzive en elementaj lernejoj, kvankam pro la demografia evoluo estas 2 milionoj da infanoj malpli ol antaŭ 10 jaroj.

Laŭ la ministerio, klarigo pri tiu situacio de perfortoj estas trovebla en la malfacileco regi siajn emociojn kaj esprimi parole siajn frustrigojn. Kazoj de lernejoĉikanado atingis la nombron de 72 778 en 2009. Tio estas nur la oficiala nombro.

Raporto aperis kun statistikoj en Francio sub la titolo “Statistikoj pri la brutalo”. Ankaŭ instrua artikolo, sub la titolo “Intimidation” (timigo), en la kebeko “Enciklopedio de la morto — La morto tra la landoj kaj epokoj. En Britio, enketo de la asocio Young Voice (Junaj voĉoj) ĉe 2 772 lernantoj en la jaro 2000 montris ke 61% el la junaj viktimoj de lernejoĉikanado iam pensis pri memmortigo.

Esploroj de la norvego Dan Olweus, profesoro pri psikologio en la Universitato de Bergen,



inspiras iniciatojn por preventi kaj bremsi tiun fenomenon. Francingvanoj povas legi artikolon sub la titolo "Harcèlement et brimades entre élèves" (Turmentado kaj ĉikanado inter lernantoj). Alilingvanoj povas simple fari retserĉadon per la vortkombino "Dan Olweus bullying" (aŭ "bullismo" en la itala, "Acoso escolar" en la hispana, "Koulukiusaaminen" en la finna, "校園欺凌" en la ĉina, ktp.

Tiu afero koncernas ankaŭ la poresperantan agadon. La angla vehiklas kulturon, kiu ne taŭgas por la tuta homaro. Ĝi kontribuas al disvastigo de la usona vivmaniero "American way of life" kiel modelo por la tuta homaro. Granda specialisto de la mediatroj, profesoro Herbert Schiller, elvokis la problemon de "Usona sencerbigo" publikigita ankaŭ en la Esperanto-versio de "Le Monde Diplomatique". La problemo estas en tio, ke tiu sencerbigo disvastiĝas per la angla lingvo pli kaj pli frue trudata en lernejoj programoj. Mi memoras pri eldiro laŭ kiu Las Vegas same allogas homojn kiel lampolumo altiras muŝojn. Bedaŭrinde, forta proporcio de la homoj kondutas same kiel muŝoj...

**Ĉikanado, tradukita en la franca per "harcèlement" — turment(et)ado — kaj "intimidation" — **timig(et)o.*

Artikolo kun ligiloj aperigita unuafoje en la propra lpernity-blogo de la aŭtoro.

Fumado mortigas, vi jam scias, sed...



...ĉu vi sciis ke fumantoj, kiuj konsumas inter 1-24 cigaredojn tage havas duoblan riskon sinmortigi? Kaj tiuj, kiuj fumas pli ol 25 cigaredojn tage havas kvaroble plian riskon

ol tiuj, kiuj neniam fumis. Tion asertis sciencistoj el Usono per esploro inter ĉirkaŭ 100 000 flegistinoj, publikigita en 1993.

Nia reta fadeno

Kion niaj legantoj parolis pri la temo ĉe Interreto

Zita Dittel SZALONTAY - Hungario

Homoj perdas esperon, ĉar oni perdis la Fonton de la espero. Mondo malsaniĝas. Multaj ne scipovas elteni ŝarĝojn, ĉar ili ne komprenas la sencon de eltenado. Helpus reveno al la pura fonto = Dio.

Ho-young SONG - Koreio

En mia lando, sinmortigo okupas la kvinan rangon inter la kaŭzoj de mortoj.

Se temas pri trajto de koreoj, koreoj ĝenerale emas senĉese kompari sin kun aliuloj kaj strebas por superi ilin, kio fakte helpis al la ekonomia evoluo kiel pozitiva faktoro. Sed kiu ne fariĝus deprimita en tia socio? Oni severe konkurencas en lernejo, laborejo kaj aliaj sociaj grupoj

Guillaume ARMIDE - Francio

Krom la sinmortigoj pro neelteneblaj laborkondiĉoj aŭ pro troa monŝuldo, plejparto el ili okazas en la industriaj landoj. Ĉe la kompanio France Télécom, okazis 17 sinmortigoj en 2008, 18 en 2009 kaj 23 en 2010.

Sergey TYRIN - Israelo

Dependas de la kulturo kaj de tio kion unuopulo pensas ke oni atendas de li, ĉu ne?

Jen vidu grekojn: Ilia ekonomio disfalas, sed ili tute ne sentas sin mizeraj aŭ deprimitaj, ĉar ili ne emas konkurenci, sed anstataŭe kuniri plaĝen.

Facebook ricevas sinmortigan alarmon

La retejo "Facebook" ekfunkciigis novan sistemon, kiu ebligas al uzantoj informi la skipon de la retejo pri homoj, kiuj enrete donas signojn pri sinmortigo.

La servo funkcios per formularo disponebla en la helpa centralo de "Facebook". Por utiligi ĝin, oni devas sciigi la nomon de la uzanto, kiu bezonas helpon, sendi ligilon en kiu li publikigis mesaĝojn aŭ indikojn pri sia simortigemo kaj aliajn detalojn.

La sendo kaj ricevo de la infomoj okazas samtempe,

tiel la skipo de la retejo povas alvoki la policon se tio necesas. La nova servo estas iniciato de la Brita NRO (senprofita organizaĵo) La Samarianoj kaj "Facebook".

Ĝi aperas post serio da sinmortigaj anoncoj publikigitaj en la retejo.

En kazoj, en kiuj la polico ne estos vokita, la okazaĵraportoj estos senditaj al la NRO, kiu povos kontakti la personon por doni konsilojn.

Kial oni ne rajtas sinmortigi?

ALEXANDRE BAUDRY – FRANCIO

En niaj nuntempaj okcidentaj socioj, sinmortigo estas tre tikla afero. En plejmulto de la landoj, ĝi estas severe malpermesita, kaj iam estis eĉ punata per mortpuno en kelkaj ŝtatoj.

Ĉu oni rajtas sin mortigi? Tio dependas de la vidpunkto. La demando pli ekzakte estas, ĉu la socio permesas al vi, donas al vi la rajton sin mortigi. Tiusence, via korpo kaj ĝia uzo (aŭ ĉesigo) ne plene estas via propra decido, sed kondiĉa de bonvolo de la aŭtoritatoj, kaj ja tiel estas. Ĉu vi rajtas drogumi? Ne, ĉar tiel vi detruas vian korpon kaj socian vivon, kaj iĝas ŝarĝo por la socio. Malpermesoj drogumi kaj morti povas esti komprenataj sur la sama nivelo.

Kristanaj religioj malpermesas sinmortigon. La sinmortigulojn atendas la infero. La kialo estas simpla: vian korpon kreis Dio, kiu donacis ĝin al vi. Sinmortigi signifas detrui kreaĵon de Dio. Ateistoj povus opinii ke tio estas bona maniero kaŝi pli fieran kialon, nome akcepti sian kondiĉon anstataŭ fuĝi de ĝi, eĉ se ĝi estas la plej mizera kiun oni povas imagi.

Ĉar ja temas pri fuĝo. Fuĝas la junuloj kiuj decidas fari la «grandan salton». Ili fuĝas de vivo kiun ili ne akceptas aŭ de destino kiu al ili ne plaĉas. Adoleskeco ja estas danĝera tempo por tio, ĉar oni kapablas gravajn agojn sen mezuri ilian gravecon.

Krom tiuj pensaĵoj, estas tamen bonaj kialoj por deziri morton. Kiam oni scias gravan malsanon, kiu estos dolorega, kaj grave ŝanĝos

la korpon, aŭ ke oni jam estas en tiaj vivkondiĉoj, kaj tio ne estas ŝanĝebla. Tamen eĉ en tiaj kondiĉoj, eŭtanazio estas konsiderata en plej multo de la mondo kiel mortigo, kvankam oni povus supozi ke en tiuj esceptaj kondiĉoj estus dece doni permeson.

Aldone al religiaj ideoj, la socio ne povos akcepti morton kiel solvo, pro moralaj sintenoj, ĉar esence la homa socio timas la morton, kaj malfacile komprenas tiujn kiuj atendas ĝin. Tial sciencistoj elpensis metodojn por daŭrigi la vivon ĝis ĝia plej ekstrema absurdo, plilongigante agonian vivon de mortonto por pliaj tagoj. Samtempe aperis en la malsanulejoj io, kion oni nomas la «mildigaj» flegoj, por plej komfortige akompani tiujn kiuj mortontas.

Sed eĉ tiuj flegoj, kiuj provas kvietigi doloron kaj malkomforton, ne povas tute forviŝi la mizerecon en kiu troviĝas malsaneguloj kaj maljuneguloj. Aliflanke, «doni» morton en tiaj kondiĉoj povas esti konsiderate kiel homa ago. Tio estas unu el la diferencoj inter la Homo kaj plej multo de la bestoj: la Homo plene konscias pri sia neevitebla fino. En tiu kadro, li povas mem decidi pri ĝi, kvankam

li ne povis decidi pri sia naskiĝo. Tial eŭtanazio estas vidata de kelkaj kiel parto de plej malsovaĝaj socioj.

Imagu: morgaŭ oni anoncas al vi ke vi havas gravegan malsanon. Ĝi daŭros monatojn, estos ege dolora, vi finos vian vivon paralize, ne povante mem manĝi, vin lavi aŭ feki. Ĉu vi ne ŝatus almenaŭ havi elekton inter ĝisfina vivo kaj pli frua morto, ankoraŭ bonfartante, havante okazon ĝisi vian familion en bona kondiĉo, tiel ke ili havos bonan memoron pri vi? ■



Mortopuno

En la anktiva Romo, kvankam akceptita kelkfoje, la sinmortigo estis riproĉata. Se soldato provis sinmortigi, li estis traktata kiel dizertanto kaj la puno por tia krimo estis...morto! Sed la puno por tia ago ne estas ekskluzivaĵo de antaŭ-kristanaj civilizacioj. En landoj kiel Italio, Francio kaj Germanio, la sinmortigo estis punata per la enterigo de la kadavro ekster sankta grundo (ofte ĉe veturejo-randoj) kaj per konfisko de la propraĵoj de la sinmortiginta persono far la Ŝtato ĝis la 18-a jarcento. Kaze de vana sinmortiga provo, la puno estis korpaj suferigoj kaj enprizonigo. Anglio estis la lasta lando, kiu malkrimigis sinmortigon, en 1961.

Libera arto kaj senpagaj artistoj

Respondo al la artikolo "Ĉu kopirajto mortigas Esperanton?" Kontakto n-ro 239/240

SERGEO TYRIN – ISRAELO

Dum la 45 jaroj en la filma industrio, Francis Ford Coppola rafinis sian personan unikan etikan kodon pri kreado de filmoj, kiu konsistas el 3 simplaj reguloj: 1) Verku kaj enscenigu nur originalajn scenarojn; 2) Produktu ilin helpe de la plej moderna teknologio; 3) Financu ilin per propraj rimedoj.

Komence de 2011, en konversaci-rondo kun lokaj studentoj en la Internacia Film-Festivalo en Marakeŝo, li prezentis sian vidpunkton pri la nuna stato de rajt-observado en la arta mondo:

"La lingvo de la kin-arto kreigis helpe de eksperimentado – de homoj ne plene sciantaj kion fari. Bedaŭrinde, post 15-20 jaroj, ĝi iĝis komerca industrio. Homoj akiris monon per la kino kaj ekdiris al la pioniroj: 'Ne eksperimentu. Ni volas gajni nian monon. Ni ne volas riski.'

"Iam mi trovis citaĵon de Balzac, kie li parolas pri juna verkisto, ŝtelinta kelkajn liajn prozo-verkojn. Kio preskaŭ igis min emocie larmumeti estis liaj vortoj: 'Mi tiom ĝojis ke tiu juna viro prenis de mi.' Ĉar estas ĝuste tio kion ni deziras. Ni volas ke vi prenu de ni. Ni volas ke vi, unue, ŝtelu de ni. Vi prenos kion ni donas al vi kaj vi esprimos tion en via propra voĉo kaj jen tiamaniere vi trovos vian voĉon.

Tiel vi komencas. Poste, unu tagon, iu ŝtelos de vi. Kaj Balzac diris jene en sia libro: 'Tio ĝojigas min tiom ĉar ĝi igas min senmorta; pasos 200 jaroj kaj homoj estos farantaj arton kaj iasence mi estos parto de tio.' Do, mi dirus tiel: ne zorgu ĉu estas dece prunti aŭ preni, aŭ fari ion simile kiel iu kiun vi admiras, tial ke temas nur pri la unua paŝo – kaj vi devas fari la unuan paŝon.

"Oni devas memori ke estas nur la lastaj kelkcent jaroj, maksimume, ke artistoj okupiĝas pri mono. Artistoj neniam akiradis monon. Artistoj havis patronon, kiel la gvidanto de la ŝtato aŭ la duko de Vajmaro aŭ kiu ajn, foje la eklezio. Alio-

kaze, ili havis laboron. Mi havas kroman laboron. Mi ja faras filmojn; neniuj diktas almi kion fari. Sed mi perlaboras mian monon en la vin-industrio. Vi laboru en alia kampo kaj vekigu je la kvina matene por verki vian scenaron.




La franca verkisto
Honoré de BALZAC

La ideo ke Metallica aŭ iu rokmuzikisto estas ekstreme riĉa ne nepre plu veros. Ĉar, enirante novan epokon, probable la arto estos senpaga. Povintus esti ke la studentoj pravus. Ili havu la eblon elŝuti muzikon kaj filmojn en komputilon. Oni pafmortigos min pro tiu ĉi diraĵo. Tamen, kiu diris ke arto devas kosti? Sekve, kiu diris ke artistoj devas perlabori per arto?

En la malnovaj tempoj, antaŭ iuj 200 jaroj, se vi estis komponisto, la sola maniero por vi gajni monon estis vojaĝi kun la orkestro en la rolo de dirigento, ĉar nur tiel vi estus pagata kiel muzikisto. Ne ekzistis surbendigo. Estis neniu honorarioj pro registrita ludado. Kaj mi daŭre insistas: provu apartigi la kin-arton disde la ideo de mon-gajnado. Ĉar ekzistas alternativaj vojoj. ■

La plena intervjuo kun s-ro Coppola (en la angla) aperis en "99% by Béhance" : <http://the99percent.com/articles/6973/Francis-Ford-Coppola-On-Risk-Money-Craft-Collaboration>.

Francis Ford Coppola estas usona reĝisoro kaj scenar-verkisto, kiu filmis kelkajn el la plej konataj filmoj en la mondo, inter kiuj "La Baptopatro" (The Godfather), "Apokalipso Nun" kaj "La Konversacio". En la komenco de la 70-aj, kune kun aliaj renomaj reĝisoroj, li promociis nekonvenciacajn ideojn kiuj defiis la tiutempajn kino-teĥnikojn.



Vilaĝo kiu rezistas

En la lasta Kristana vilaĝo de Cisjordanio, bierfarejo kreita de Nadim C. Khoury en 1994 produktas unu el la plej famaj drinkaĵoj de la regiono. Li ankaŭ rakontas kiel "Oktoberfest" kunvenigas milojn da judoj, kristanoj kaj islamanoj tien.

"Mi vivas meze de nenie kaj ĉiun tagon aŭ preskaŭ ĉiun tagon mi sincere tre feliĉas, ke la tuta mondo pretas veni al ni, vidi kiel nia eta bierfarejo fabrikas ĉi tiun tre bonan bieron, la "Taybeh Bieron". Oftege, mi diras al mi mem, ke ni freneziĝis, ĉar ni restas en la plej alta monta regiono de Palestino, ĉirkaŭataj de kontraŭleĝaj israelaj kolonioj kiuj vastiĝas ĉirkaŭ Taybeh, kaj preparas la "Grandan Israelon".

F o j e e s t a s elektromalŝaltoj, foje akvomanko, kaj ofte militistaj invadoj. Tamen io granda okazas en ĉi tiu biblia Judeo, ĉe la vojkrucejo de Judeo kaj Samario [en Cisjordanio].

Danke al la helpo de Dio, ni daŭre produktas la plej bonan bieron de Mezoriento, kun la sento, ke tio estas nia maniero pace rezisti. Dio havas multan humuron. Li permesas al malplimulta Kristana familio vivi inter 98% Islama loĝantaro, kaj fabriki produkton kies

konsumo estas malpermesita al la plimulto de la Koran-fiduloj. Dio donis al ni grandan forton, por ke ni povu vivi malgraŭ blokado de vojoj kaj ĉiutagaj ekonomiaj malhelpoj,

se ne paroli pri eternaj problemoj ĉe kontrolejoj.

Lastatempe, la israela politiko pri okupado trudas al ni 3-horan ĉirkaŭiradon ĝis kontrolejo provizita per skanilo, por ke ni povu liveri la Taybeh-bieron al Jerusalemo, urbo kiu tamen troviĝas nur 25 minutojn for de nia bierfabrikejo. Se ili volus nin bankrotigi, ili ne alie farus: benzino en ĉi tiu mondoparto kostas eble kvaroble pli ol ĝi kostas aliloke! Oni konsideras nin ĉiutage pli kiel teruran minacon por Israelo!

Ni dediĉas nin al fabrikado en



La ekstero de la bierfabrikejo en Taybeh


Foto: Ralf LOTYS - CC-BY

danke al sia biero



La 2010a Oktobrafesta afiso

Palestino de tre bona produkto, por ke konsumantoj elektu palestinajn produktojn kaj helpu Palestinanojn daŭre labori. Kaj Israelo ŝatus plu inundi la palestinan merkaton per siaj israelaj produktoj, biero, glaciaĵoj, laktaĵoj aŭ terpomaj pecetoj. Mi diras al mi, ke Dio havas



Taybeh biero

humuron, pro tio ke, iel, li permesas, dank' al biero, konigi la malgrandan Kristanan komunumon de Palestino.

Homoj venas el la kvar anguloj de la mondo por viziti la vilaĝon Taybeh, kompreni finfine, ke nia vilaĝo estas Kristana ekde du mil jaroj, ekde la vizito de Kristo. Ĝi estas ankaŭ la lasta ekskluzive Kristana vilaĝo de la tuta Palestino. Malĝojige, ĉu ne? Kien foriris aliaj kristanoj? Ili foriris al pli favoraj lokoj, mi imagas, al Usono, Aŭstralio, Eŭropo, Suda Ameriko, kie ili povas konstrui pli agrablan vivon por siaj infanoj. Sekve, homoj venas nin vidi por biero kaj foriras kun mesaĝo de amo. Almenaŭ ili komprenas, ke tio, kion ni deziras, estas

esti liberaj, ĉar libereco, justeco kaj paco permesas la kunekzistadon de ĉiuj religioj, ĉiuj individuoj kaj ĉiuj etnaj grupoj.

De ses jaroj, ni organizas la "Oktoberfest" de Taybeh komence de oktobro, kaj tiuokaze ni bonvenigas pli da Kristanoj, Islamanoj kaj Judoj ol ajna konferenco pri la regiono. Taybeh reprezentas pacan reziston pere de eksterordinaraj penoj tie farataj por plenumi simplajn aferojn, festi la vivon. En medio kie ni neniam scias kio nin atendas morgaŭ, la sukceso de ĉi tiu festo venas de la nura fakto ke ĝi ekzistas. La "Oktoberfest" de Taybeh fariĝis unu el la emblemaj ferioj de Palestino: Homoj venas tien el Brazilo, el Japanio kaj Eŭropo por montri solidarecon.

Se vi opinias, ke Palestinoj faras nenian ne-perfortan agon, sciu, ke milionoj da ili faras sian eblon por ĉiutage plenumi ordinarajn agojn, kiel labori, iri al la lernejo aŭ organizi festojn. Por ni, ĉi tiuj estas tiom multe da ne-perfortaj agoj kontraŭ la teruraj kondiĉoj en kiuj ni

vivas pro la okupado. Venu nin vidi kaj subteni nian lokan produktadon. Kaj, survoje al Taybeh, eble ankaŭ vi sentos la humuron de Dio..."

PRI TAYBEH

Taybeh estas menciita en la Evangelio laŭ Johano (Nova Testamento). La Kristana loĝantaro, kiu hodiaŭ enkalkulas ĉirkaŭ 1 500 personojn, estas sekve tre antikva. Krom tri preĝejoj, la vilaĝo inkluzivas la restaĵojn de Bizanca baziliko, kie okazas nuntempe arkeologiaj serĉoj. La bierfabrikejo pri kiu temas en la artikolo, estis kreita de familio de ortodoksa pastro en 1994 por reprodukti la lokan ekonomion post la interkonsentoj de Oslo [1993].■

Fonto de la artikolo:

The Palestine Note, Eventeo.net

Tradukis - Nicola kaj Marc el Eventeo.net



Esperanta kinarto vivas malgraŭ la esperantistoj

ALEKSANDER OSINCEV – RUSIO

La jaron 2010 oni sendube povas nomi rimarkinde fruktodona por la esperantista filmarto. Dum la originala E-kinarto montras nur signojn de la vivo, la neesperantistaj produktantoj surprize reagis al nia internacia planlingvo per bonkvalitaj kinoverkoj. Hodiaŭ mi ŝatus resumi atingojn de filmo-produktantoj en kaj ekster Esperantujo kaj disdoni miajn verdajn Oskar-premiojn[1]. Por ekscii pli multe pri tiuj filmoj, vizitu la Verdajn Filmejon.




Sam Green dum la viva prezento de «Utopia in four movements» (Utopio en kvar movimentoj)

La malkovro de la Jaro iĝis la fama usona reĝisoro Sam Green. Ĝuste li vekis plej grandan atenton de esperantistoj per sia unika dokumenta filmo «Utopia in four movements» (Utopio en kvar movimentoj). La Esperanto-piratoj, tiuj, kiuj kutimas elŝuti ĉion senpage, ĉi-foje ricevis nenion, la filmo estas ne simpla, eĉ mi hezitus nomi ĝin «filmo», pli precize ĝi estas viva prezentaĵo, kunfandiĝo de viva rakonto de reĝisoro, viva muziko kaj tre bonstila video. La «vikilikita»[2] 10-minuta specimeno de unu el la kvar partoj de la «filmo», dediĉita al Esperanto, provokis ŝtormon

en glaso da akvo. Ŝajnis neebla la cinikeco de la aŭtoro, kiu ricevinte monsubtenon ankaŭ de ESF[3], filminde esperantistojn en la japana UK, prezentis ilin kompletaj idiotoj. La zorgoj tamen estis superflujaj, la grupaj vizitoj de tiuj prezentoj far esperantistoj pruvis la bonajn intencojn de Sam Green kaj malkaŝis baldaŭan surprizon. Mi donas al li Oskar-premion pro «Plej bona ŝajnigo de la troja ĉevalo».

Septembro donis al ni mallongan filmeton «Senmov» de turkia reĝisorino Tuğçe M. Sen. La Esperantlingva filmeto kun Esperanta nomo kaj fikcia enhavo, produktita




La mallongfilmo «Senmova» de turkia reĝisorino Tuğçe Sen

de neesperantisto ankoraŭ en 2009, iĝis konata al la esperantistaro nur en 2010. La fina venko venis en la filmo: en baldaŭa estonteco ĉiuj parolos en Esperanto kaj su-
rekrane aperas subtekstoj en la angla. La reĝisorino deklaras sin mondcivitano kaj sendube meritas Oskar-premion pro «Latenta esperantisteco». Kaj tute ne gravas, ke ŝia verko aspektas pli kiel reklamo de tabako.

Mian Oskar-premion «Pro kuraĝo» mi donus al alia mallonga filmeto de neesperantisto, nome «Conlang: the movie» (Planlingvo: la filmo) de komencanta usona reĝisorino Marta Masferrer. Ŝi rompas nian imagon pri la bonkoreco de esperantistoj, prezentante ilin kiel malheroojn. En la vera mondo, regata de kaŝitaj esperantistoj, tio estas granda kuraĝo. La ĉefa rolulo, aĉulo kaj esperantisto Kip, nerekte helpis kolekti al Marta preskaŭ \$3500 por pagi sindikatojn kaj por la muziko. En tiu historio pri amo, esperantistoj ricevas ne kison kaj kompaton, sed baton. Interese, kiom da esperantistoj masofiste mendis oficialan DVD-diskon kun la filmo, por kiu Chuck Smith tradukis la subtekstojn en Esperanton.

Dum multaj E-organizoj vegetas, la brazila Esperanto-movado bole-
gas. Oktobre Verda Filmejo ricevis informojn pri tre atentinda projekto, kiun iniciatis kaj efektivigis fama brazila movadano kaj arte-
m u l o Pedro Cavaleiro. Dank' al sia filo Olavo, ĉarma komencanta aktoro, kaj liaj

La spiritista brazila filmo ĵus aperis sur oficiala lumdisko kun Esperantaj subtekstoj



rilatoj Pedro esperantigis subtekstojn por la spiritisma filmo «Nosso Lar» (Nia Hejmo), filmitan kun subteno de 20th Century Fox. La filmo jam kolektis 20 milionojn da dolaroj kineje kaj sendube estos populara en formo de DVD kaj Bluradi-KD, kie aperis subtekstoj en la internacia lingvo. Oskar-premion pro «Atingo de la Jaro» mi donas al Pedro kaj Olavo. Espereble por Olavo ĝi estos ne la lasta kinopremio.


En la jaro 2010 estis finfilmita pola filmo «Esperanto» en Usono. Jam ne estas sekreto, ke en tiu 25-minuta eksperimenta filmo eĉ unu vorto ne sonas en Esperanto kaj la sankta vorto estis prenita nur por indiki specialan manieron de komunikado inter du fratoj. Rezulte la filmo havas neniun rilaton al Esperanta filmarto kaj pro tio meritas nenion.

Kiom senfrukta estis la originala Esperanta film-arto en la jaro 2010, tiom abunda ĝi estos en 2011.

La Eldona Fako Kooperativa de SAT decidis post longa tempo produkti profesion filmon pri Esperanto. Por tio la kooperativo dungis la profesion francan filmiston Dominiko Gaŭtiero kaj zorgas pri la filmado. Laŭ la buĝeto je 50 000 eŭroj la filmo devas iĝi la plej multekosta filmo iam ajn farita en Esperantujo. La filmado komenciĝis en novembro 2009 kaj la filmo devas aperi en marto 2011. Min zorgigas nur la fakto, ke la filmo transdonos la vidpunkton de reĝisoro pri la movado kaj pro tio la «injekto de vero» je 50 000 eŭroj povus iĝi iom tro multekosta. Kiun Oskar-premion doni al ĝi montros la futuro, ĉu pro «Plej bona filmo de la jaro 2011», ĉu pro «Plej amara pilolo».

La ankaŭ jam menciita Sam Green ŝajne volas plibonigi sian reputacion antaŭ esperantistoj. Jam post du monatoj li finas sian 30-minutan dokumentan filmon «The Universal Language», dediĉitan al utopia

Afiso por Conlang - the movie (Planlingvo - la filmo)



lingvo Esperanto. Ankaŭ li pretendas la statuson de «la unua dokumenta filmo pri Esperanto farita de neesperantisto». Laŭ Sam ĝi estus pli profunda ol nura prezento de historio de Esperanto kaj en ĝi aperos pli adekvataj esperantistoj: Renato Corsetti, Humphrey Tonkin, Arika Okrent kaj multaj aliaj parolantoj de Esperanto.

Espereble la Esperanta filmarto en la nuna 2011-a jaro nur kreskos, ankaŭ dank' al la fondita krea unuiĝo «Filmoj sen limoj», kiu teamigas kreemajn filmoŝatantojn kaj filmofarantojn, kaj kiu deklaras subtenon por kreantoj de modernaj sonvidaj materialoj en Esperanto.

Mi daŭre funebras pri la malapero de la entrepeno «Imagu-Filmoj», kiu iam donis esperon al multaj filmoŝatantoj, ke la Esperanta filmarto evoluos en direkto de ludfilmoj. Sed la vaka loko ne povas esti malplena ĉiam, restas esperi, ke baldaŭ nin ĝojigos bonaj filmoj kaj altkvalitaj filmaj projektoj. ■



Krea unuiĝo «Filmoj sen limoj»

Rimarkoj

- [1] Oskar-premioj estas la Premioj de la Akademio de la Kinematografiaj Artoj kaj Sciencoj en Usono, atribuataj al la plej bonaj filmoj, kaj al la plej bona laboro farita de profesiuloj laborantaj en la kinarto. [Vikipedio]
- [2] Aludo al skandala retejo Wikileaks kun sekretaj materialoj de la usona registaro.
- [3] ESF (Esperantic Studies Foundation) estas usona organizo, finance subtenanta grandajn E-projektojn, inter kiuj estas lernu.net.

Permesilo CC-BY-NC-ND

Fontoj

Libera Folio, Verda Filmejo, Filmoj sen limoj, SAT, IMDb, Esperanta Vikipedio



Blogo de radia aŭskultanto

Antaŭ kelkaj monatoj mi suferis trafikajn akcidenton. Ĝi estis sufiĉe grava ĉar mia kranio forte vundiĝis kaj oni devis operaci min. La kuracisto volis taksi mian mensan staton antaŭ la operacio, do li demandis min "kiel okazis la akcidento?" kaj mi, por ŝajnigi trankvilecon, respondis vortludeme "Doktoro, kiel vi vidas, ne temas pri akci-dento, sed pri akci-kapo". Samtempe, la kuracisto nervoziĝis (li pensis ke mia menso estas ja klare afekciita kaj mia edzino trankviliĝis (ŝi pensis ke mi estas tiel stulta kiel ĉiam).

Finfine oni kondukis min en la operaciejon kaj la kirurgo, farante sian laboron, metis metalan peceton ene de mia vundita kranio kaj mi resaniĝis post kelkaj ripozaj semajnoj. Ĉio iris glate dum la unuaj tagoj kiam mi denove agis kiel kutime: mi revenis al la laboro, al gimnastejo kaj al la muziklernejo. Relative baldaŭ mi aĉetis novan aŭtomobilon (la malnova ne postvivis la akcidenton) kaj, kiam la timo malaperis, mi denove stiris ĝin.


Antaŭ la "malfeliĉa okazaĵo" mi jam devis uzi okulvitrojn por ŝofori dumnokte pro mia eta miopeco, do alvenis la momento kiam mi devis uzi ilin por pli bone vidi la ŝoseon. Unue mi ne bone rimarkis la aferon, ĉar mi kutime havas la aŭtomobilon radion ŝaltita, sed, kiam pro stranga brueto, mi malŝaltis la radion, mi ekkonsciis pri la novaĵo: mi povis aŭdi radion. Mi celas, sen ŝalti iun elektronikan ilon, mi kapablis aŭdi radion! Poste, fakulo klarigis al mi, ke temas pri ebla sed malofta kombinaĵo inter la metala peceto kiun mi havas kranie kaj la okulvitra stangeto kiu tre apudas al la metalereto. Kiam mi iomete movis la stangeton, mi eĉ povis aŭdi malsamajn radiostaciojn!

Kompreneble, mi baldaŭ aĉetis novajn okulvitrojn, kiuj ne havas ferajn stangetojn, kaj la problemo solviĝis. Sed mi ne forĵetis la malnovajn, ĉar foje

mi ŝatas promeni piede aŭ aŭte kun miaj "magiaj" okulvitroj aŭskultante radion.

Hieraŭ, ekzemple, mi piediris tra la urba parko aŭskultante mian preferatan programon, kaj tie mi renkontis amikinojn, kiun mi ankoraŭ ne vidis ekde la akcidento. Post kisetoj, brakumo kaj kielvifartumado, mi baldaŭ demetis la okulvitrojn, kaj ŝi demandis min: "Vi aspektas bele kun viaj okulvitroj, kial vi demetas ilin?" kaj mi trankvile respondis: "Ho, por pli bone aŭdi vin!".

Kompreneble, ŝi pensis ke mi ne estas la sama viro post la akcidento. ■



Movada rubriko ene de Kontakto

Laŭ la nova koncepto de TEJO pri Kontakto, farita baze de enketumado de legantoj, kie plimulto ŝatus legi iom da movadaĵoj, en Kontakto aperas ekde nun kvar aldonaj paĝoj dediĉitaj ĝuste al la movadaj temoj. TEJO-Tutmonde ne plu aperos sendepende kiel gazeto, sed transiros al la aldonaj paĝoj de Kontakto sub nova rubriko. Movadajn raportojn daŭre sendu al tejo-tutmonde@tejo.org

Intervjuo kun la nova TEJO-Volontulino Manuela Ronco

TT: Saluton, Manuela! Vi estas la nova TEJO-volontulo ekde ĉi aŭtuno. Kio instigis vin ekvolontuli en la CO?

Manuela Ronco: Saluton, Nicola! Mi ekde jaroj okupiĝas pri interkulturo, kaj lastatempe eniris la E-movadon... tie mi trovis novajn motivaĵojn, kaj multe deziris pliigi mian aktivecon en tiu ĉi medio. Krome, mi ĉiam deziris labori en internacia organizo.

TT: Interese, ĉu vi aktivis en asocioj pri interkulturo? Pri kio temis?

MR: Mi volontulis dum kvin jaroj en junulara interkultura asocio, kie mi ĉefe instruis la italan lingvon al enmigrintoj, kaj aranĝis diversspecajn agadojn por ilia integriĝo.

TT: Ĉu vi antaŭe volontulis eksterlande?

MR: Jes. En 2007 mi pasigis naŭ monatojn en Slovakio, pere de projekto de Eŭropa Volontula Servo. Tie mi volontulis en iu urba centro por la libera tempo de infanoj kaj adoleskuloj.

TT: Ĉu vi lernetis la slovakon?

MR: Jes, mi lernis ĝin... sed nun mi preskaŭ forgesis. Fakte, tio estis malfacila sperto por mi, ĉar en mia urbo malmulte da homoj scipovis la anglan, kaj mi malkovris tion nur kiam mi estis tie.

TT: Amuze! Kiel kaj kial vi eniris la E-movadon?

MR: Ĝuste en Slovakio, mi eksciis pri la ekzisto de Esperanto, pere de iu faldfolio de SKEJ... kaj mi komencis interesiĝi pri ĝi. Reveninte en Italio, mi sekvis kurson ĉe la Torina Esperanta Centro, sed nur post multe da tempo mi eniris la movadon. Mi komencis helpante IEJ-estraranojn dum la organizo de la pasinta IJF, ĉar mi estas laborema homo, kaj volegis helpi... eble pro tio, dum tiu IJF, mi fariĝis estrarano de IEJ.

TT: Tuj post via enposteniĝo vi komencis plene naĝi en TEJO-aferojn, kiel ekzemple la estrarkunveno. Rakontu iom pri viaj unuaj impresoj, pozitivaj kaj malaj.

MR: Vi neniam havos klaĉojn de mi! :-). Mi sopire atendis la estrarkunvenon, ĉar antaŭe mi konis eĉ ne unu el la estraranoj. Mi iasence deziris pozitive impresi ilin... pro tio komence mi iomete faris al mi zorgojn, sed fakte ĉio iris glate, kaj mi vere ŝatis la etoson kiu regis.

TT: Kia estas normala tago de TEJO-volontulo? Ĉu vi iam koŝmaris pri via taskaro?

MR: Nu, kutime mi enŝaltas la oficejan komputilon je la 9.30, kaj mi komencas tralegi la retroŝtonon, respondi al mesaĝoj, publikigi novaĵojn, ktp. Intertempe homoj kontaktas min per tujmesaĝiloj, kaj mi klopodas respondi afable, eĉ kiam mi ricevas strangajn petojn :-).

TT: Ĉu vi emus rakonti la plej strangan peton kiun vi ricevis? Kompreneble anonime :-).

MR: Ekz. estis homo kiu turmentis nin por havi Esperantajn kristnaskajn dezirkartojn, ĉar li volas meti ilin, kun tiuj en aliaj

lingvoj, sur granda arbo en sia urbo (se mi bone komprenis). Fakte, tio ne estas malbona ideo, sed ni simple ne havis kristnaskajn bondezirkartojn...

TT: Kion vi opinias pri la taskaro? Ĉu troa por unu homo?

MR: La taskaro estas sufiĉe ĝenerala, se interpreti ĝin laŭ la disponeblo de tempo, kaj de forto... sed jes, ĝi estas troa, mi neniam sukcesas fari bone ĉion necesan, ĉefe nun kiam mi ĵus alvenis, kaj ankoraŭ devas multon lerni.

TT: Ĉu ankaŭ aliaj helpas vin? Ekzemple aliaj oficistoj aŭ estraranoj aŭ aliaj volontuloj?

MR: Jes, la oficistoj de UEA estas tre disponeblaj, kaj kiam mi spertas problemon ili helpas min. Mi ankaŭ daŭre turmentas la estraranojn, sed precipe Aleks per miaj demandoj... tamen, mi esperas ke baldaŭ mi pli kapablos labori memstare! Fakte, estus bone havi konstantan oficiston, kiu havu superrigardon de ĉio kio okazis antaŭe en la organizo.

TT: Kiel vi vidas viajn venontajn monatojn en la CO?

MR: Mi esperas ke, kiam mi estos pli ol nur konatiĝinto kun la oficeja kaj ĉiutaga parto de la laboro, mi havos pli da tempo por kunlabori kun la estraro pri kreivaj taskoj, alportante personajn kontribuojn en la TEJO-agadon.

TT: Kia estas via sperto pri Nederlando ĝenerale kaj Roterdamo specife? Ĉu vi ŝatas loĝi tie? Rakontu vian unuan kulturalan ŝokon.

MR: Mi jam havis antaŭe mallongan feriadon en Nederlando, kaj tiam mi havis malbonan sperton pri la bicikloj, kaj pri la vetero... sed nun mi jam alktimiĝis al la nederlanda vivstilo, kaj mi ofte biciklas feliĉe sub la pluvo! Tamen, mi ne havis apartajn kulturajn ŝokojn, ĝis nun, ankaŭ ĉar mi ne multe interrilatis kun nederlandanoj.

TT: Kia urbo estas Roterdamo? Ĉu junulo vivas komforte tie?

MR: Mi sufiĉe ŝatas Roterdamon, eĉ se oni ne vere povas diri ke ĝi estas bela. Sed ĝi estas viva, moderna, plena je eventoj...

TT: En Facebook mi legis ke vi ekhavis biciklon. Ĉu oni jam ŝtelis ĝin? Ĉu vi mem planas ŝteli alian biciklon tiel nur por integriĝi plene en la nederlandan socion? :-)

MR: Ĝis antaŭ kelkaj horoj ĝi estis en sia loko... mi esperas ke ĝi estos ankoraŭ tie. Ĉiukaze, ĝi rezistis jam pli ol mia antaŭa biciklo en Torino... ŝtelita post unu tago!

TT: Dankon pro la plaĉa intervjuo!

MR: Tute nedankinde!





Varsavia
Vento

ORGANIZANTOJ
de
JES

Junulara E-Semajno en Burg, Germanio. Laŭ vidpunkto de unufoja organizanto!

PAWEŁ FISCHER-KOTOWSKI - POLLANDO

dej

pej

Mia lasta jaro ne estis iel ajn speciala. Se mi devus iel difini ĝin, certe mi farus tion de negativa vidpunkto, kaj - inter ni dirante - mi ĝojas, ke ĝi jam finiĝis. Eĉ la jarŝanĝa festo ne prezentiĝis iel speciala, kaj pro multaj devigoj mi ne havis tempon pripensi la aferon kaj prizorgi ke la Nova Jaro estu bonvenigita de mi digne - gaje kaj bonhumure. Ja ĉiu jarŝanĝo estas iel alveno al io nova. Ĉe mi, ne pro iaj religiaj kialoj, ne pro superstiĉoj, sed simple pro mia kalendaro, kiu indikas la ritmon de mia vivo. Do, mi simple emis eniri la novan jaron plej optimisme, sen zorgoj kaj malĝojoj. Kaj...

Feliĉe varsoviaj esperantistoj oktobre proponis al mi kunlaboron, por la pol-germana jarŝanĝa aranĝo - la Junulara E-Semajno. Mi iom hezitis - mi tiam havis diversajn aliajn sindevigojn kaj, ĉefe, mankis al mi sperto ĉi-riate. Mi fiere identiĝas kun Esperanto, kaj mi sekvas novaĵojn de la Esperanto-movado, sed iel okazis ke aranĝoj ĉiam evitis min. Aŭ hazarde mi evitis ilin? Ne gravas. Mi akceptis la ideon kaj membriĝis en la organiza teamo de JES 2010. Mi ricevis komunan taskon kun Karina, ankaŭ ŝi novulino ĉi-kampe: ni devis okupiĝi pri la taga programo. Jam dekomence, iom nature, ekestis inter ni divido - ŝi okupiĝis pri la distra parto, mi - pri la tema kaj movada. Ĝojaj ricevinte tiom respondecajn taskojn - do, ni estas serioze traktataj, ĉu ne? - ni pacience atendis la sekvojn.

Tempo pasis kaj ni, preskaŭ kiel infanoj en nebulo, pli kaj pli maltrankvile kontaktis unu la alian demandante kion, kiam, kiel fari? Alvenadis al ni mesaĝojn - pri iu gufujo (pri kio temas?), pri aligatorejo (ĉu iu volas alveni kun sia hejma besteto?), kaj fine ni eĉ ekpensis ke eble ni ne partoprenas preparadon de Esperanto-aranĝo sed ian bestĝardenon! Ĉiuj niaj duboj kaj demandoj feliĉe estis solvataj de Łukasz kaj Irek, kies helpemo ĉiam estis sentebla. Verdire, sen iliaj amikaj kaj paciencaj klarigoj, ni ankoraŭ

nun sidus, kaj gratante niajn kapojn pripensadus la aferojn... Iom post iom, ni pli kaj pli komprenis. Daŭris la korespondado kun la kontribuantoj, la pensado, kiel organizi ĉion surloke, kaj la ĝojo de ĉiu unuopa renkontiĝo. Fakte, vi devas scii ke la organizado de la aranĝo donis al mi ne nur

taŭgajn spertojn, sed ankaŭ multe, multege da ĝojo, ridoj kaj amuzo.

De tiu senzorga etoso eliris min la tago de la vojaĝo al Burg. Ho ve!", mi ekpensis frumatene. "Kaj se ĉio falos surloke? Se mi detruos al iu belan jarŝanĝon, pro neĝusta, nesufiĉa prizorgo de aferoj?". Feliĉe, ĉiuj duboj foriris kaj la vojaĝtempo estis amuzplena (amuz-plena, ne am-uz-plena!). Ridoj ne finiĝis! Sume la veturado daŭris ĉirkaŭ 15 horojn, kaj JES-ejen ni alvenis kelkajn minutojn post noktomezo.

Surloke estis jam esperantistoj, ĉiuj freŝaj kaj pretaj... atendis la programon! Ho! Tiu, feliĉe, devis komenciĝi nur post ĉirkaŭ unu tago kaj duono, do restis ankoraŭ tempo por kontroli ĉu ankaŭ surloke ĉio estas en ordo. Mi mensogus, se mi skribus, ke mi scipovis senprobleme tuj orientiĝi tie kaj tuj ekkompreni mian rolon dum la aranĝo. Pli-malpli mi konis miajn devojn, sed ne ĉiun problemon mi mem scipovis solvi, kaj mi multe lernis dum tiu aranĝo de pli spertaj - Łukasz, Paŭlo, Julia, Manuela. Cetere ne nur pri organizado mi lernis, sed ankaŭ... lingve. Iom honte mi devas konfesi, ke neniam antaŭe mi havis okazon nomi manĝaĵojn kaj manĝilojn (do mi pli manĝis ol murmuris dum manĝotempoj).

Daŭre mi ĝojas ke Łukasz sukcesis konvinki min engaĝiĝi en la organizadon de la aranĝo. Mi multe lernis, mi ekkonis novajn, interesajn homojn, mi plispartiĝis ankaŭ pri ali-kampaj, diversaj aferoj, babilante kun unuopaj homoj. Dankojn specife mi direktu al Szabi - kiu prilumis ne nur tempon dum la JES, sed ankaŭ post la aranĝo.

La jarŝanĝa nokto estis tiu momento, kiam mi spertis plej multe. Mi ne memoras kiam mi laste estis tiom sentema kiom dum tiu nokto. Larĉoj forsaltis de miaj okuloj, laŭ rapideco de aŭtomata pafilo - mi rigardis, sentis kaj eĉ partoprenis tion, pri kio dirado ofte kaŭzas mokojn en eksteresperanta medio - internacian amikecon. Ne tian fabelan, ne tian simple afablan, ne tian por-aktori-antaŭ-nekonvinkituloj, ne tian supraĵan kaj nesinceran, sed veran. Veran amikemon, toleremon kaj interkomprenon. Ne nur lingvan, sed ĝeneralan, homan.

Ludoviko Zamenhof estis genia homo - dankon al ĉiuj kiuj daŭrigas lian idearon! Mi emas membriĝi en tiu societo.

PS. Kaj daŭre mi pensadas pri tiuj problemoj pri nesufiĉa nombro de projekciiloj. Karaj kontribuantoj, ankoraŭfoje ricevu mian pardonpeton. Ĉi-jare ni estos bone preparitaj ĉi-kampe, kontrolu mem!

Dankon al
la organiza teamo,
pro la JES-
okazigo!

2^a NOVA (Novjara Aranĝo en Brazilo)

RAFAEL HENRIQUE ZERBETTO - BRAZILIO

Ĉu vi jam parolis en Esperanto dum la jarŝanĝo? Pluraj brazilaj junuloj faris tion en vilaĝo proksima al la urbo San-Paŭlo, okaze de la 2-a NOVA (Novjara Aranĝo), okazanta inter la 30-a de decembro 2010 kaj la 2-a de januaro 2011. Krom promenadoj en la vilaĝo kaj ĉirkaŭa arbaro, esperantistoj kantis, dancis, kuiris, promenis, padumis, amuziĝis per ludoj, sume ĝuis tre agrablan etoson.

Historio

En julio 2009, oni proponis, dum la 29-a BEJK (Brazila Esperantista Junulara Kongreso), ke estu porjunula Esperanta aranĝo en Brazilo, bazita sur eŭropaj junularaj seminarioj de esperantistoj. Inter decembro kaj januaro ne okazas gravaj Esperantaj kongresoj en Brazilo kaj estas someraj ferioj, ĉefe por studentoj, kaj pro tio oni elektis ĉi tiun epokon por la aranĝo, baptita NOVA. Ekde tiam, BEJO (Brazila Esperantista Junulara Organizo) jam organizis du tiuspecajn aranĝojn. La unua NOVA okazis en januaro 2010 en bienhotelo apud la urbo Charqueada [Ĉarkeada], en la subŝtato San-Paŭlo kaj la 24 partoprenantoj tre ŝatis ĝin. Por la dua NOVA, estis elektita la vilaĝo Paranapiacaba [Paranapiakaba], distrikto de la municipo Sankta Andreo [port.: Santo André] en la ĉirkaŭaĵoj de la urbo San-Paŭlo.

La vilaĝo

Paranapiacaba estis fondita de britaj fervojistoj en 1867 kun la portugala nomo "Estação do Alto da Serra" [Montar-pinta Stacidomo] kaj poste ricevis la nomon "Vilaĝo Martin Smith". La nomo Paranapiacaba venas el la tupia lingvo kaj signifas "loko, de kie oni vidas la maron", pro tio ke ĝi estas sur Ĉemara Montaro [port. Serra do Mar] kaj de tie eblas vidi, kiam la vetero sufiĉe bonas, la metropolan regionon de Santos, marborda urbo kie troviĝas la plej grava sudamerika haveno. Post sia apogeo dum la epoko de la brita fervoja kompanio São Paulo Railway, la fervojo estis aĉetita de la brazila registaro en 1946 kaj la plejmulto de la britoj foriris. Plena de bonkonservitaj historiaj konstruaĵoj, Paranapiacaba estas, nuntempe, muzea histori-turisma vilaĝo plena de anglotipaj lignaj domoj kaj ĉirkaŭita de mirindaj plejzaĵoj kaj akvofaloj.

Kvankam Paranapiacaba estas inter du gravaj metropoloj, Santos kaj San-Paŭlo, tie oni sentas sin en kampara etoso, tre for de grandaj urboj: la nura vojo al la vilaĝo estas senasfalta; tie estas freŝa aero kaj en la ĉirkaŭaĵoj estas nur la Atlantika arbaro. Preskaŭ ĉiutage nebulas kaj pluvetas.

La aranĝo

Venintaj el pluraj regionoj de Brazilo, la 30 partoprenantoj de la dua NOVA multe babilis kaj amuziĝis ene de la gastejo, kie okazis improvizitaj festetoj en dormoĉambroj kaj en la salono. Gitarludado,

kantado kaj kartoludoj estis la plej

kutimaj aktivajoj en la gastejo dum la tuta aranĝo. Krom tio, okazis agrablaj babiladoj dum la manĝoj kaj promenadoj tra la urbo, kiam oni aĉetis la tipan lokan trinkaĵon: la sukerkanan brandon, en kiu oni maceras cambuci [kambusi], frukton abundan en la Atlantika arbaro.

Dum la unua tagmanĝo ni babilis pri esperanto kun la restoraciestro kaj li donis al ni botelon de hejmfarita brando por gustumi. Ĉiuj tostis kaj ĝoje babilis dum longa tempo. Poste, en la gastejo, okazis kelkaj gitarludadaj rondoj, dum oni verkis (terure aĉan, NdLR) kanzonon tre facile memoreblan por omaĝi la aranĝon: "NOVA, NOVA, NOVA / La novaĵo estas NOVA". Vespere, ni iris kune al alia restoracio por vespermanĝi kaj iu partoprenanto kunportis gitaron. Plena de esperantistoj, la manĝejo farigis la plej ĝoj-elsenda loko en la urbo dum tiu nokto: Oni povis facile aŭdi niajn kantanon kaj babiladojn.

La 31-an de decembro, ni promenis tra la arbaro ĝis Taquaruçu [Takvarusu], najbara vilaĝeto, kaj banis nin en akvofalo. Vespere, preskaŭ ĉiuj trinkis Kajpirinjon (tipan brazilan trinkaĵon faritan el sukerkana brando, citrono, sukero, kaj glacio) kaj sukerkanan brandon kun macerata cambusi antaŭ la lasta 2010-a vespermanĝo, post kiu ĉiuj atendis kune, surstrate, la alvenon de la nova jaro. Ni kisis, brakumis kaj estis gajaj kiam la artfajraĵoj anoncis 2011. Simpatiaj vilaĝanoj kaj turistoj venis brakumi nin kaj bondeziri. Ĉiuj festis ĝis la nokto-nokto-fin' kaj la ĉefa amuzaĵo dum la frumateno estis "mokŝminki" iun dormantan ulon per dentopasto.

Alia amuza ludo estis la trezorĉasado. Oni kaŝis trezoron (kelkajn Esperantajn librojn kaj revuojn) kaj dividis la trezorĉasistojn en du grupojn, kiuj bezonis solvi enigmojn por trovi la trezoron unu pli frue ol la alia.

Tamen, la tempo tro rapide pasis kaj la adiaŭa horo alvenis: la gastejo iom post iom malpleniĝis kaj ni apartiĝis kun la deziro partopreni NOVAn 2012, kiu povos esti eĉ pli bona kaj amuza – se vi aliĝos! Informoj pri la 3-a NOVA estos disponeblaj ĉe la retpaĝo de BEJO. Novjarumu kun ni!

Pliaj informoj pri NOVA troveblas ĉe: <http://bejo.esperanto.org.br/ao/>



INTERNACIA ESPERANTA LITERATURA KONKURSO "HRISTO GOROV – HRIMA"

Hristo Gorov – Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Li verkis plurajn librojn, kiuj respegulas la pozitivajn homajn trajtojn: la solidarecon, la batalon por la bono, la strebon por honesta vivo.

Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson, kiu okazos je ĉiuj tri jaroj. En la konkurso povos partopreni verkistoj, poetoj, ĵurnalistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso havos la jenajn branĉojn:

- poezio
- prozo
- artikolo

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per du poemoj, originale verkita en Esperanto.

La noveloj devas esti ĝis-4-paĝaj kaj ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu novelo, originale, verkita en Esperanto.

La poemoj, noveloj kaj la artikoloj devas esti komputile kompostitaj.

La konkurso ne havas apartan temon.

La artikoloj estu dediĉitaj al signifa Esperanta aranĝo.

La gajnintoj ricevos grandajn premiojn.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 1-a de septembro 2012 al la retadreso: modest@abv.bg aŭ per la poŝto al adreso: Georgi Mihalkov, Sofio – 1229, "Nadejda" V, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario.

La rezultoj estos anoncitaj en la monato oktobro 2012.

JEB-tendumado

PAUL ROBERTS – BRITIO

Okazas regule en Britujo diskut-rondoj <http://www.esperanto-gb.org/eab/eab_events/drondo_background.htm> (mallonge: 'drondoj'), dum kiuj progresantaj esperantistoj povas uzi praktike la lingvon, diskutante verajn kaj gravajn temojn.

Por paroligi siajn membrojn JEB (Junularo Esperantista Brita) decidis adopti kaj modifeti tiun modelon por sia plej lasta evento, kiu okazis en Septembro. La formo de la evento estis tri-taga tendumado en publika tendumejo proksima al la marurbo Brajtono. Dek du esperantistoj el kvar landoj ĉeestis la eventon (inkluzive trupeton invadantan el Francujo) kaj sidis ĉirkaŭ la fajro ĝis frua mateno etosumante. Malgraŭ brita pluvo sabate, ni ekskursis al Brajtono, bela kaj vigla urbo kun plaĝo (kie kelkaj el ni eĉ pli malsekiĝis malintence en la maro). Ni manĝis kontente en trinkejo kaj poste vizitis apudan akvariejon. Dimanĉe ni denove vizitis Brajtonon, sed ĉi-foje sub brila suno, renkontante aliajn esperantistojn kiuj ne ĉeestis antaŭe. Tiam ni vagis ĉirkaŭ la urbo kaj naĝis en la maro.

Ĉiutage ni okazigis niajn diskutrondojn kiuj instigis la ĉeestantojn paroli Esperanton kaj pli vastigi sian vortprovizon per nekutimaj temoj. La temojn oni anoncis antaŭe, kaj tiel ni povis

antaŭpreparigi kaj tio eble helpis kuraĝigi la progresantojn. Ni diskutis 'Ikonajn Fotojn', 'Mirindaĵojn de la Nuna Mondo' kaj 'Inspirajn Citaĵojn'. La diskutoj estis viglaj, pensigaj kaj tre interesaj kun diversaj opinioj prezentataj (kaj debatoj pri la lingvo mem estis minimumaj).

Unu el la partoprenantoj kiu loĝas en Brajtono, parolis al loka gazeto pri la eventoj kaj donis tiel bonan promocion por Esperanto kaj la brita movado. La tendumejo kie ni loĝis, estis tre bone ekipita por tia kunveno, kun sufiĉe da spaco por loĝigi ĉiujn kaj loko por fajro kiu ebligis al ni spiti la veteron kaj pluridi. Oni eĉ preparis grandegan poton da senpaga vegetara supo kiel brulaĵon por niaj mens-motoroj.

Entute la afero estis tre amuza kaj instrua semajnfino kaj pruvas ke ja eĉ Britio havas sian propran lokon sur la Esperanta junula mapo.



Zamenhof en ni: Paco kaj naturprotektado

Raporto pri la 15^a nacia metiejo, okazinta en la provinco Guantánamo, Kubo

ARIADNA GARCÍA GUTIÉRREZ – KUBO

La 15a Metiejo okazis en la provinco Guantánamo, de la 16a ĝis la 19a de decembro 2010. Partoprenis 7 provincoj kaj proksimume 30 esperantistoj. La aranĝo okazis en la kampadejo Jakabo Abajo, belega loko. Ĝi havis tre bonan servon, la strando estis belega, estis preskaŭ paradizo.

La programo estis tre riĉa, okazis prelegoj pri bona nutrado, Zamenhof kaj kulturo de paco, kaj pri tre grava preĝejo situanta en Guantánamo, kiu havas tre interesan historion. Kompreneble aliaj gravaj okazaĵoj estis la unua nacia kunveno kun gejunuloj de diversaj partoj de nia lando, inter kiuj Camagvey, Havano, Pinar del Río kaj kompreneble Guantánamo. Tie ni pritraktis tre interesajn kaj gravajn temojn rilate al la JSK (Junulara Sekcio de Kubo), por ke ĝi povu revigliĝi en ĉiuj partoj de nia insulo, por ke la gejunuloj estu aktivaj kaj por kreskigi la movadon ĝenerale en la tuta lando.

Fakte por mi tiu estis unu el la gravaj celoj kaj ankaŭ sukcesoj de tiu ĉi aranĝo, kiu ebligis al ni konatiĝi kun novaj gejunuloj, revidi

aliajn esperantistojn kaj diskuti, babili, kaj festi kune en kaj pri esperanto. Nokte ni festis en la diskejo senhalte, prezentis skeĉojn kaj krome ni havis tute hazardan pluvegon kiu tre amuzigis la etoson, ni laŭ ĝi kantis, dancis kaj kriis ankaŭ iomete. Ni havis ankaŭ sendependajn programerojn dum la tago, kiuj estis rajdi sur ĉevalo, ĝui la belan kaj agrablan maron kaj riveron.

Ekde nun ni invitas ankaŭ la eksterlandajn esperantistojn partopreni venontjare la nacian metiejon, eble okazontan en la urbo Baracoa, same mirinda urbo kiu jam havas etan videon kiu montras ĝiajn belecon kaj ne kompareblecon kun la aliaj urboj.

Nome de la JSK ni bonvenigas ĉiujn venontjare veni al Guantánamo, denove viziti KUBON!



Konkurso Partoprenu IJK-n 2011

Ni ĝojas anonci ke la fonduso "Partoprenu IJK-n" denove povas helpi al membroj de TEJO partopreni la Internacian Junularan Kongreson - ĉi jare en Ukrainio. Per ĝi eblas peti monon por parte kovri vojaĝkostojn (laŭ plej malmultekosta maniero ŝipe, buse aŭ aviadile), loĝadon en provizitaj ĉambroj kaj programkotizon (vi povas loĝi pli lukse, sed ni subvencias nur la prezon por loĝado en la provizitaj ĉambroj (por kelkaj personoj), do la diferencon vi pagas).

La estraro pritraktos la kandidatiĝojn kaj disdonos maksimume 3 premiojn — la premioj financos ĝis 80% de ĉiuj kostoj.

Kondiĉoj por kandidatiĝi estas:

Vi estas membro de TEJO kaj aĝas sub 30 jarojn

Vi pretas ricevi kaj realigi taskon de TEJO dum kaj post IJK (la tasko estas interkonsentota kun la TEJO-estraro)

Por partopreni, vi devas plenigi aliĝilon. Ĝi haveblas en formatoj .odt kaj .doc en retejo de TEJO. Kunsendu

ankaŭ referencan leteron de 1 TEJO-membro.

Via kandidatiĝo povas esti sendita retpoŝte al oficejo (a) tejo.org aŭ paperpoŝte adresita al la Centra Oficejo kun la indiko TEJO – partoprenu IJK-n, kaj ĝi devas alveni al ni antaŭ la 17a de aprilo.

Se vi volas helpi la gejunulojn partopreni la IJK-n, bv. konsideri kontribui al la fonduso "Partoprenu IJK-n".





Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Ĝi estas la junulara sekcio de UEA, la Universala Esperanto-Asocio. TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto. La organizo defendas kulturen riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliĝo al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.

TTT-ejo: www.tejo.org

Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 1 76 - NL-301 5 BJ Rotterdam - Nederlando
Tel.: (01 0) 436 1 044 - Faksilo: (01 0) 436 1 751 ,
Retadreso: oficejo@tejo.org

Estraro de TEJO

Prezidanto, Eksteraj Rilatoj: Gregor HINKER gregor@tejo.org
Informado, unua Vicprezidanto: Oleksandra KOVYAZINA sasxa@tejo.org
Ĝenerala Sekretario: Paulina KOZUCHOVÁ paulina@tejo.org
Landa Agado, Vicprezidanto: Irmína SZUSTAK irmina@tejo.org
Kasisto: Sergej TYRIN kasisto@tejo.org
Kongresoj, Seminarioj, Aktivula Trejnado, Vicprezidanto: Lukasz Maciej ZEBROWSKI lukiz@tejo.org

Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la revuon Kontakto kun TEJO-Tutmonde rubiko
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso
- eblo partopreni en seminarioj
- eblo envolvi en interesa kaj internacia agado Kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur www.tejo.org/patrono aŭ de la Centra Oficejo).

Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la Esperanta movado.
- Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe www.tejo.org/aktivula_trejnado)
- Eldono de Pasporta Servo (www.pasportaservo.org), la adresaro de gastigantoj kiuj pretas senkoste gastigi Esperantistojn; ĉiujare aperas ĝisdatigita eldono.

Subteno la agadon de TEJO

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO-n en sai agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi.

Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agadoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiki celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas donaci tiel por specifaj celoj:

- Fonduso "Partopreni IJK-n" – TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

Ĉu KONTAKTO plaĉas al vi?

Se jes, abonon ĝin por vi, por viaj geamikoj kaj por viaj kursanoj.

Ĝojgu nun vin mem aŭ vian amikon per donaco, kiu alvenas la tutan jaron!

Se vi estas kursgvidanto aŭ klubestro, vi ricevas 20% da rabato je kolektiva abono (sufiĉas 6 abonoj).

Se ni sendas ĉiujn ekzemplerojn en unu pako al unu adresu, la rabato estas 40%!

Abonu kaj abonigu nun ĉe kontakto.tejo.org!

KOTIZTABELO DE UEA POR 2011

La jenaj tarifoj validas ankaŭ por postaj jaroj, se la pago estos farita antaŭ la 30-a de septembro 2011

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	14	36	90	54	32	180
Aŭstrio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Belgio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Brazilo/eŭro	5	12	31	19	11	62
Britio/pundo	8	20	50	32	19	100
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	670	400	2100
Danio/krono	70	180	450	285	170	900
Estonio/eŭro	7	17	42	27	16	84
Finnlando/eŭro	10	25	61	38	23	122
Francio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Germanio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Greklando/eŭro	8	20	50	32	19	100
Hispanio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Hungario/forinto	1750	4400	11000	7000	4200	22000
Irlando/eŭro	10	25	61	38	23	122
Islando/eŭro	10	25	61	37	22	122
Israelo/eŭro	7	18	46	28	17	92
Italio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Japanio/eno	1120	2800	7000	4200	2520	14000
Kanado/dolaro	14	34	85	51	31	170
Latvio/lato	4	11	27	17	10	54
Litovio/lido	20	50	130	80	50	260
Nederlando/eŭro	10	25	61	38	23	122
Norvegio/krono	80	200	500	300	180	1000
Nov-Zelando/dolaro	18	46	115	69	41	230
Pollando/zloto	25	60	150	95	55	300
Portugalia/eŭro	8	20	50	32	19	100
Rusio/eŭro	5	12	31	19	11	62
Slovakio/eŭro	7	17	42	27	16	84
Slovenio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Svedio/krono	95	240	600	380	230	1200
Svislando/franko	14	34	85	51	31	170
Usono/dolaro	13	32	80	48	29	160
TARIFO A/eŭro	6	16	41	25	15	82
TARIFO B/eŭro	5	12	31	19	11	62

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgo laŭ Belgio; Kipro kaj Malto laŭ Slovenio.
TARIFO A: Bahamoj, Honkongo, Korea Respubliko, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MG: Membro kun Gvidlibro kaj monata reta novaĵbulteno.

MJ(-T): Membro kun Jarlibro kaj la revuo Esperanto rete (kaj ĝis inkl. 29 jaroj membro en TEJO kun Kontakto sen plia pago).

MA(-T): Membro-Abonanto kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto.

DM(-T): Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon Esperanto, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon Kontakto.

DMJ(-T): Dumviva Membro kun Jarlibro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MJ; ricevas la Jarlibron kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membrecon en TEJO kun Kontakto.

SA: Simpla abono al la revuo Esperanto, sen membreco en UEA.

Kto: Abono al la revuo Kontakto, sen la membreco en UEA/TEJO.

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA).

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon Kontakto kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO.



2011

14a - 27a de Julio

IJK EN UKRAINIO

www.ijk-67.retejo.info



LA ĈEFTEMO:

DAŬROPOVA EVOLUO:

NOVA KONCEPTO POR HOMARO

